MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 N° 5 JUL/AUG/SEPT 1982

---

# Informilo

---

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

INFORMILO
-----------------

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

================================

FEL - ŜPARKONTO
----------------------------

FIKSDATAJ MONDEPONOJ
---------------------

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-5510531-55
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

================================

LIBRO-SERVO SONORILO
Doornstraat 22
2610 WILRIJK

Direktoro : Monique VEREECKEN

Telefono : 031/27 24 05

Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN

Telefono : 031/16 05 05

Direktoro : Paul PEERAERTS

====================================

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



Kara Leganto,

Jen, la kongresoj jam ne plu estas pli ol memoraĵoj. Detalajn informojn pri ili vi trovos en la septembraj numeroj de ESPERANTO kaj HEROLDO DE ESPERANTO, tiu ĉi lasta estas cetere senpage havebla !)

Tamen, se la kongresoj mem estas memoraĵoj, ili malfermis al ni novajn vojojn, novajn horizontojn; ili malkovrigis taŭgajn, kompetentajn homojn, kiuj fakte estos por nia movado plia certigo rilate al la bazo de nia ĉies agado.

En la protokoloj vi trovos pli da detaloj pri tio.

Tio tamen ne signifas, ke vi nun povas ekdormeti,ĉar ni ja trovis personojn por daŭrigi kun ni la laboregon, ke vi povos nun "enrampi vian konkon" dirante "por vivi feliĉe, vivu kaŝite". Tute, tute ne !

Antaŭ ni kuŝas prepar-tereno al la jubilea jaro 1987, la centjariĝo de la internacia lingvo ESPERANTO.

Se vi volas - ĉu ni ne ĉiuj volus ? - ke tiu jaro estu grandioza evento, ni devos ĉiuj, ĉ i u j kune (ek)labor(eg)i.

FEL-estraro nun estas ellaboranta kvinjaran laborplanon. Pri ĝi temos en nia venonta

<u>ĜENERALA KUNSIDO</u>

okazonta sabaton la 16-an de oktobro 1982 ekde 14.00 horo en nia Esperanto-domo, Frankrijklei 140, ANTWERPEN, al kiu ĉiu estas elkore bonvena.

Fakte ni insistas pri via ĉies partopreno, ĉar finfine vi devos jes aŭ ne aprobi / akcepti la novan plilarĝigitan estraron (vd. la protokolon kaj la invitilon) samkiel la preparatan laborplanon.

Venu, bonvolu kaj donu vian opinion, viajn rimarkojn, sugestojn ktp aŭ petu klarigojn se necese. Finfine, nia sukceso dependas ankaŭ de vi !

Do, montru vian interesiĝon en la movada programo kaj helpu nin per via ĉeesto .

Anticipan dankon.

La estraro.

Nia ĉefdeligitino komunikas :

" KIU ŜATUS (KAJ KAPABLUS) FARIĜI FAKDELEGITO POR IEKA ?
Internacia Esperanto Klubo Aŭtomobilista ĝis nun havas nur kotizperantinon.
Loĝante en malgranda vilaĝo, ŝi ne povas propagandi, ŝi konas nenion en tiu
branĉo kaj petis la sekretarion de IEKA trovi anstataŭanton.
Estus bone ke li (aŭ ŝi) sufiĉe sciu pri aŭtomobiloj, havu kontaktojn kun
aŭtomobilentreprenoj, ankoraŭ pli bone se li sufiĉe interesiĝus pri la
organizado de reteto da FD en Belgio.
Proponojn oni sendu al la ĉefdelegitino : A. Orsolini, 6 rue P. Pastur,
6000 CHARLEROI. "

----------

De nia aktivulo en la Ministerio pri Nederlanda Kulturo (Herman Deceuninck)
ni sciiĝis, ke la Biblioteko de la Ministerio pri Edukado prunt-disponigas
al ĉiu, kiu laboras en la instruado, la libron "ESPERANTO SNEL ASSIMILEREN"
de W. De Smet. La katalognumero estas : NE 23788 B. La bibliotekrespondeculo :
S-ino Thomas. Tel 02/511 08 30.

-----------

Sekvinda iniciato :

Nia amiko ALbert Claesen el Diepenbeek; konstatinte ke la komunuma biblioteko
de Genk havas sur sia bretoj ESPERANTO GRAMATIKO de P. Kempeneers kaj la
(elĉerpita) Prisma vortaro de Middelkoop, donacis al ĝi :

Leerboek voor Esperanto, Zondervan en Manders
Meulenhof Esperanto Woordenboekje
Tra la Labirinto de la Gramatiko, Faulhaber
Kelkaj Floroj Esperantaj, A.J. Witteryck
La vojoj de la Eklezio, Papo Paŭlo VI
Ne tiel, sed tiel ĉi, Faulhaber
Monato, Jarkolektoj 1981 kaj 1982 (ĝis junio)
El Popola Ĉinio, jarkolektoj 1981 kaj 1981.

Gratulojn Albert.

---------

U E A sciigas :

Ekde 1983 aperos alternativa revuo aldone al ESPERANTO de UEA, laŭ la ekzemplo
de la en pasint-novembro aperinta facila numero de ESPERANTO. Temas pri pli-
simpligita revuo, taŭga por komencantoj. Ĝi aperos 6 fojojn jare sub la nomo



K O N T A K T O. Se estos sufiĉe da abonantoj, ni povos negoci kolektivan
abonadon , kiel jam okazas kun ESPERANTO.

Tamen, abono al KONTAKTO ne donos individuan membrecon. Jes kune kun la
Jarlibro por malpli ol 26-jaruloj.

La abonprezo sumiĝas je 17 guldenoj aŭ egalvaloro.

----------

F L E J A komunikas :

Jen korekto pri la FLEJA-jarraporto. (vd la martan numeron de INFORMILO)

Sub la punkto FLEJA-ESTRARO KAJ TASKITOJ, bonvolu legi :

" FLEJA - Jarraporto 1981
ESTRARO KAJ TASKITOJ
Elektitaj okaze de la jarkunveno de 07 03 1981 en Antverpeno."

Kaj pri la ero INTERNA REGULARO - propono : ĝi estas akceptita kaj do
definitiva. La vorton "propono" vi forstreku. JP VDD

-----------

Pri la "jarraporto de la sekretario" el la ĝenerala jarkunsido en Kastelo
de Ham, en Steenokkerzeel, ni ricevis jenan leteron de S-ro E. Van Damme,
kiu tiam ne povis ĉeesti, sed kiu ege interesiĝas pri la movada agado kaj
multe laboras en tiu kampo.

" Via propono pri kreado de sektoroj ŝajnas al mi tre interesa. En la kazo
de geinstruistoj jam ekzistas tia sektoro kun la diferenco, ke ili devas
pagi sufiĉe altan kotizon (pro la internacie publikigita revuo). Laŭ via
sistemo verŝajne pli da geinstruistoj membriĝus, ĉar aliĝo estus senpaga.
Mi tamen ne kredas ke ni havus dank'al tio pli da aktivuloj ! Tio ne
gravus, se ni nur tiamaniere povus interesi pli da homoj.

Bonvolu noti ke, pro geografiaj kialoj, la gemembroj de unu sektoro ne
povus kunveni pli ol 3 - 4 foje jare. Sed intertempe ili povus labori
perletere ktp. kaj aperigi de tempo al tempo raporton, ideojn, dokumentojn
ktp. Eble estas kelkaj (aŭ sufiĉe multe da) Esperantistoj kiuj interesiĝus
pli pri tia labormaniero al pri la amikaj kunvenoj de sia loka grupo.

Estus tamen domaĝe, se la gemembroj de ĉiu sektoro perdus kontakton kun la
aliaj esperantistoj. Instruistoj, ekzemple, certe povas interesiĝi pri
fervojista agado, pri filatelio ktp., eĉ sen deziri aliĝi al tiuj grupoj.

Cetere, mi opinias ke en la agado de aliaj oni ĉiam trovas inspirojn kaj stimulojn por la sia propra. Tiurilate estas bedaŭrinde, ke FEL kaj APE ne plu sufiĉe estas informitaj pri la agado de la alia. Sekve, ŝajnas al mi ke ni bezonus ĝeneralan revuon en kiu ĉiu sektoro aperigus novajojn pri sia agado, tiamaniere ke ĉiu ĉiam havu ĝeneralan ideon pri kio okazas en la lando. En tiu revuo oni povus ankaŭ anonci la ekziston de sektoroj (grupoj) aŭ alvoki al kreado aŭ al kunlaboro. Sed tiam ni devus alfronti la problemon de ĝenerala revuo !

Alia demando estas la prizorgado de tre precize difinitaj taskoj kaj la trovo de respondeculoj por ili. Kiu ekzemple povus/konsentus respondeci pri T-ĉemizoj, aŭ pri presado de gluafiŝetoj, aŭ pri flagoj, aŭ pri gramatikaj ekzercoj, aŭ pri verkado de leteroj al lokaj reklamgazetoj. La diverseco de la eblaj temoj estas tro granda por ke oni trovu en ĉiu loka grupo sufiĉe da homoj por alfronti ĉiujn. Oni devus do disponi pri listo de artikoloj kaj temoj kun nomo kaj adreso de la respondeculo. Por postenoj por kiuj oni ne trovus respondeculon, oni povus proponi ilin al membroj por la daŭro de nur unu jaro, kun la promeso, malŝarĝi ilin eĉ se neniu alia volontulo troveblas.

Jen kelkaj ideoj pri via propono. Laŭ mi la eksperimento certe indas, kaj mi deziras al vi bonan sukceson !

Sincere via,

Emiel Van Damme.

Dankon, S-ro Van Damme. Kuraĝige estas konstati ke ne ĉio, kion ni proponas perdiĝas neatentite.

Pliaj reagoj estos danke akceptitaj.

--------------

Plian leteron ni ricevis el Pollando. Jen parto el ĝi.

Mi estas mezaĝa virino ... Mia unua peto privata estas jena :
Bonvolu kontakti min kun ĉarmaj, kulturaj, interesaj esperantistoj el via Federacio en simila aĝo.
Mia dua peto , la aficiala estas jena :
Antaŭ kelkaj tagoj mi estis elektita kiel estraranino de nia urba Esperanto-Asocio. Mi komencas agadon en E°-movado. Mi deziras ligi en nomo de la estraro kontaktojn kun alilandaj esperantistoj el simila urbo en via lando por interŝanĝi spertojn, helpi unu la alian en evoluo de la Esperanto movado en la mondo, por interŝanĝi prelegojn je diversaj temoj.
Al mia urba asocio apartenas pli ol 200 anojn. Gliwice havas pli ol 200.000



loĝantojn. Ĝi estas urbo de industrio kaj inteligentularo.
Estus bone se ni trovus similan urbon ĉe vi kaj ligus amikecon inter niaj Esperanto-Asocioj.
La amikeco inter homoj el diversaj nacioj estas hodiaŭ tiel bezonata !
Ni esperantistoj kreu tiun amikecon kaj fratecon inter nacioj !
Bonvolu kontakti min kun la estraro de iu urba asocio ĉe vi.
Mi esperas baldaŭ ricevi vian afablan respondon kaj mi salutas vin verdastele.

Irena MIODYNSKA
44-100 GLIWICE
Koscinszki 32/5, Pollando.

Kiu grupo interesiĝas pri tiu ĉi propono ?

Bonvolu ne nur rekte kontakti la petinton, sed ankaŭ averti nin !

Dankon.

----------------

Albert Claesen sendis al ni tiujn ĉi de li faritajn traduketojn.

EL INFANBUŜETOJ

"Nu, aŭskultu onklino," diras Anjo, "nia katino naskis kvar idojn en la pasinta nokto, sed ĉu ĝi jam edziniĝis ?"

Hundoj estas pli rapide maljunaj ol homoj. En malpli ol du monatoj, ili aĝas unu jaron ...

Mi komprenas kiel kokido elvenas la ovon, sed mi ne komprenas kiel ĝi eniras ĝin.

La instruisto montras fotografaĵojn de pavo, kaj demandas al Karlo : "Kio estas tio ?". Karlo respondas : "Estas kokino kiu floras".

Inter ĉiuj bestoj la kukolo estas la plej lerta, ĉar ĝi povas elparoli sian propran nomon.

La virkoko vekiĝas en la frua mateno pro sia laŭta kokokrio.

La hundo mordis la urbestron kaj kelkajn aliajn hundojn.

Kiam simio povos diri : mi estas simio, ĝi jam estas homo.

Erinaco estas kakto kiu povas kuri.

----------------

# TRILANDA RENKONTIĜO

Sabaton, la 9-an de oktobro 1982

Renkontiĝejo : D-5160 DUEREN, Bismarckstrato 15, Stadthalle, FRG

## PROGRAMO

09.00 h. Malfermo de la giĉeto

10.00 h. Prelego de H.D. MAAS : Ĉu Esperanto estas komputila lingvo ?

11.00 h. Vizito al Potfarejo en la muzeo de LANGERWEHE.

12.30 h. Komuna tagmanĝo

Menuo : Supo

Koko "Florida" kun bakitaj fruktoj, miksita salato kaj fritita terpomoj

Deserto

14.00 h. Laborkunsido

15.00 h. Vizito al unu el la plej grandaj lignitejoj de Eŭropo en Hambach.

KOTIZO : Ĉio enkluzive : DM 20,00

| | | |
|---|---|---|
| Apartaj kotizoj : | Partopreno : | DM 5,00 |
| | Ekskurso : | DM 3,00 |
| | Tagmanĝo : | DM 17,00 |

Junuloj ĝis 18-jaraj : senpage, krom la tagmanĝo kompreneble

KONTAKTADRESO : S-ro Erwin MELLE
Alte Juelicher Strasse 129
D-5160 DUEREN
Telefono : 02421 - 41748

---